"Ridu per Esperanto"

PILO-PRESS
Internacia
Informservo

Libreto de
T. Sekelj
4,30 DM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 5/1974 - 1 feb 1974
Aperas ĉiusemajne

## Esperanto en la Aŭstria Televido

Kiel ni jam antaŭanoncis, la 17an de januaro 1974, je la 20,05 h, okazis en la Aŭstria Televido en la programero "Bildung aktuell" (Klerigo aktuale) disaŭdigo pri "Esperanto in den Schulen" (Esperanto en la lernejoj).

Oni vidis kaj aŭdis gelernantojn de Esperanto-Klaso en Viena ĉeflernejo dum leciono. Ili respondis demandojn de la instruistino, mem demandis, kantis kaj eĉ ludis dupersonan skeĉon.

Enŝovata estis klarigo de la prezidanto de "Stadtschulrat für Wien" (urba lerneja konsilistaro de Vieno), kortega konsilisto d-ro Hermann S c h n e l l, kiu diris (en germana lingvo):

"Esperanto estas nuntempe instruata en multaj landoj parte kiel libera parte kiel deviga instrufako. En Aŭstrio la unuan fojon instruado de Esperanto dum la studjaro 1926/27 okazis en ĉeflernejo por knaboj en Vieno. En la sekvaj jaroj sekvis aliaj lernejoj. Tiu evoluo subite ĉesis pro la okupado de Aŭstrio fare de la nazia Germanio. En la dua respubliko de Aŭstrio per dekreto de la instruministerio de la 1a de majo 1968 denove estis permesata instruo de Esperanto kiel libera fako kaj nun fakte estas instruata en pluraj ĉeflernejoj. Esperanto estas artlingvo, kiun oni povas ellerni sufiĉe facile. La valoro de Esperanto manifestiĝas en tio, ke unuflanke per tiu lingvo estas akceptata la ideo de la internacia interkompreniĝo inter la popoloj mem kaj aliflanke la ellernado de Esperanto donas modelan eblecon ĝenerale ekkoni la "spiriton" de la lingvo. Pro tio Esperanto speciale taŭgas kiel instrufako en la lernejoj.

Ni provis la enkondukon de Esperanto en pluraj lernejoj kaj atingis tre bonajn rezultojn. Per la lernado de Esperanto la lernejoj ekkomprenas la konstruon de lingvo ĝenerale, enpenetras en la skeleton de la gramatiko(j) kaj tiel akiras la antaŭkondiĉojn por pli facile ellerni aliajn lingvojn.

Se iu intense kaj kun sufiĉa tempo por ekzercado en semajnaj lecionoj lernas Esperanton, poste estas eble adapti bazan vortprovizon en kvar ĝis ses monatoj kaj praktike uzadi la Internacian Lingvon. Cetere mi opinias, ke la lernado de Esperanto daŭros unu ĝis unu kaj duona jaroj por esti kapabla interkompreniĝi kun ĉiu ajn.

La facileco interkompreniĝi per Esperanto kuŝas en tio, ke Esperanto havas fonetikan karakteron, t. e., ke ĉiu litero de la Esperanta alfabeto prezentas ĉiam la saman sonon."

La estro de la ĉeflernejo por geknaboj en Wien 4, Schäffergasse, supera lerneja konsilisto Erich Winkler diris, ke tiu lernejo estis la unua, en kiu post la dua mondmilito denove Esperanto estas instruata. Ekde ses jaroj Esperanto estas libervola instrufako. La instruo komenciĝas en la tria klaso kun minimume dudek gelernantoj kaj estas daŭrigata en la kvara klaso. En tiu lernejo instruas supera lerneja konsilistino Margarete Marischler kaj fakinstruistino Gertrud Rothmann.

Por la fino la prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio, d-ro Grimme, prezentis kiel ekzemplon por la internacieco de Esperanto la junan geedzan paron Qietensky, kiuj konatiĝis unu kun la alia dum la UK de Esperanto en Vieno kaj nun loĝas en Vieno. Li estas aŭstro, ŝi japanino. La elsendo trovis grandan intereson en la publiko. (Gr.)

## Aktualaj informoj

### Prelego antaŭ fervojistoj

Frankfurt/M (rkv) S-ino Elfriede Kruse, sekretariino de GEFA kaj IFEF, faris antaŭ nelonge prelegon pri Esperanto antaŭ 30 ne-esperantistaj fervojistoj en la Fervoja Direkciejo en Frankfurt.

### UEA-delegito ĉe diplomatoj

Bonn (pp) Okaze de la aŭstralia nacia festotago la 28an de januaro 1974 la ambasadoro de Aŭstralio, Ralph Harry, invitis ankaŭ la UEA-delegiton de la urbo Bonn, Erhard Herlitze, al solenaĵo. La UEA-delegito havis okazon paroli pri la Internacia Lingvo kun multaj ambasadoroj, politikistoj kaj oficistoj.

### Varsovia jubileo

Varsovio (pp) La 4an de aprilo 1974 pasos la 15a datreveno de la Esperanto-elsendoj de Radio Varsovio. Dum ĉi tiuj 15 jaroj Radio Varsovio elsendis 8 223 Esperanto-elsendojn, por kiuj oni konsumis 6 367 250 m da sonbendaj metroj.

Okaze de tiu datreveno la Esperanto-redakcio turnas sin al la aŭskultantoj kun la peto respondi al jenaj demandoj:

I. Kiun el la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio vi plej ofte aŭskultas? Je la 6,oo h aŭ je la 16,30 h?

II. Kion donis al vi la kontakto kun la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio? Ekz.: ĉu pli bonan informitecon pri Pollando; eblojn aŭdi la voĉojn de konataj Esperanto-aktivuloj; informitecon pri la Esperanto-movado; helpon en la lingvo-lernado ktp.

III. Viaj deziroj kaj sugestoj por estonto: Kion vi dezirus ŝanĝi, plibonigi en la E-elsendoj de la Pola Radio.

La respondojn oni sendu al Pola Radio, Esperanto-Redakcio
PL-00-950 Warszawa 1, Poŝtkesto 46

***************

### Jarkunveno de KEJA

Zagreb (mĝ) La 13an de januaro okazis en Zagreb la jarkunveno de Kroatia Junula Esperanta Asocio (fondita fine de la jaro 1971), sub prezido de Darinka Antoliĉ. La kunvenon partoprenis delegitoj de junularaj societoj el Bjelovar, Cakovec, Varazdin, Vinkovci kaj Zagreb. Post la raportoj okazis vigla diskuto. Estas akceptita la nova statuto de KEJA kaj la laborplano por 1974/75, kiu antaŭvidas fondon de novaj memstaraj Esperanto-grupoj, aliĝon en la laboron de la societoj ankaŭ de junpioniroj, aktivan kunlaboron kun soci-politikaj unuiĝoj, organizon de seminario por instruantoj kaj tradukantoj, organizon de internaciaj renkontiĝoj kaj de festivalo de amatora filmo en Esperanto.

De la jarkunveno estas senditaj leteroj al Junulara Asocio de Kroatio, petante akcepton de KEJA-delegacio, al Kroatia Esperanto-Ligo, postulante kreon de komuna komisiono por radio-elsendoj en Esperanto kaj ke la Esperanto-elsendoj estu disaŭdigataj vendrede anstataŭ ĵaŭde pro tio ĉar libera sabato ebligas al pli multaj esperantistoj aŭskulti la Esperanto-elsendojn.

## Rekonstruo de la Reĝa Kastelo en Varsovio

Varsovio (pp) Sabate, la 26 jan 1974, kolektiĝis la Civitana Komitato por la rekonstruo de la Reĝa Kastelo, kiu estis starigita precize antaŭ tri jaroj. La komitato konstante zorgas pri la realigo de la rekonstrua programo, pri la ekipado kaj estonta utiligo de la kastelo. El la sumiga raporto oni povis ekscii, ke la muregoj de la kastelo jam estas finkonstruitaj. Sukcese trapasas la kolektado de monaj rimedoj. Sur la konto estas 420 milionoj da zlotoj kaj 405 000 dolaroj. 60 000 personoj libervole kaj senpage laboris por la rekonstruo.

Pilo-Press ekde la komenco de la Civitana Komitato raportis pri la rekonstruo kaj alvokis la esperantistojn partopreni en la internacia solidarec-kampanjo "Rekonstruo de la Reĝa Kastelo" Rezulte de tio Pilo-Press povis transdoni al la Civitan Komitato la sumon de 1 200 GM.

Okaze de la 3a datreveno de la fondiĝo de la CivitanaKomitato Pilo-Press transsendas al la Civitana Komitato en Varsovio plian ĉekon pri 157,10 GM, kiuj estis kolektitaj dum la jaro 1973.

La lasta donacinto estis Paul Plehn, Kitzingen, kiu donacis 25 GM.

************

## Esperanto-aranĝoj 1974

### Tria Kongreso de Kristanaj Esperantistoj

La 26-a internacia kongreso de K.E.L.I.
La 35-a internacia kongreso de I.K.U.E.

en Jugendpark Hamburg-Langenhorn, Jugendparkweg 60,
D-2 Hamburg 62

Kongresa kasistino: F-ino Helga Brodthage, Reichardstr. 17-II
D-2 Hamburg 50 (Altona)

| Kongresa kotizo | ĝis 15.3.74 | post la 15.3.74 |
|---|---|---|
| IKUE- aŭ KELI-ano | 145,--GM | 150,--GM |
| ne-anoj de IKUE aŭ KELI | 155,--GM | 160,--GM |
| junuloj ĝis 20-jaraj | 120,--GM | 125,--GM |
| studentoj ĝis 30 jaroj | 135,--GM | 140,--GM |

La kongreskotizoj ampleksas tranokton, matenmanĝon, tagmanĝon kaj vespermanĝon.

La precizan daton ni ankoraŭ publikigos.

### 15a Eŭropa Feriosemajno en Svislando

La 15a Eŭropa Feriosemajno en Svislando, organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF) okazos de la 22 - 28 sep 1974 en Magliaso ĉe la bordo de Lugano-lago, dekon da kilometroj okcidente de Lugano. La programo ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, Esperanto-lecionojn diversgradajn, vesperajn aranĝojn distrajn.

Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg, Svislando.

### Tago de la malfermita pordo

Nürnberg (pp) La Esperanto-tago "de la malfermita pordo" en Nürnberg jam okazos la 17an de marto 1974 (ne la 24 mar, kiel antaŭa anoncita)

## La semajno en la radio

La sabato (26.1.) estis malbonŝanca tago por la radio-aŭskultanto, nek la Varsovia posttagmeza elsendo, nek la vesperaj Viena kaj Pekina programo en Esperanto estis kapteblaj ĉi tie en Nürnberg pro malfavoraj atmosferaj kondiĉoj. Pli favoraj estis la kondiĉoj dimanĉe matene, kvankam el la Vienaj informoj kaj prelego je la 6,45 horo estis kompreneblaj nur frazeroj. Tamen almenaŭ oni havis la certecon ke Vieno enestas la aeron. Ĉu eble por tiuj perturboj respondecas la kometo "Kohoutek", kiu aliel seniluziigis la "kredantojn je la kometa forto"?

Varsovio. La dimanĉmatena felietono "La semajno en Pollando" raportis pri eventoj kaj okazaĵoj en Pollando dum la pasintaj sep tagoj. Oni povis aŭdi citaĵojn el la registara raporto pri la plua plibonigo de la materiala situacio de la laborhomoj, pri la protektado de la socialaj rajtoj kaj la evoluo de la sanservo. Laŭ tiu raporto 11 milionoj da laborhomoj ricevas pli altajn pagojn. Speciale oni akcentis la stabilecon de la prezoj por la bazaj nutraĵoj. Tamen plialtiĝis la prezoj por nafto-produktaĵoj kaj alkohlaĵoj. Observanto sin demandas, ĉu la nafto-produktaĵoj plikostiĝis kiel sekvo de la energetika krizo, kvankam la plej granda kvanto da nafto por Pollando venas el socialismaj landoj? Sekretario Edward Gierek diris: "Ni faras ĉion, kio eblas al ni." - Finkonstruita estis ŝipo por transporti nafton kun longeco de 250 m, estonte konstrueblaj estas en polaj ŝipfarejoj ŝipoj kun 200 000 tuneloj - Dum 1973 estis konstruitaj 165 000 novaj loĝejoj - En Varsovio estis malfermita nova hotelo konstruita de sveda firmao kun 34 etaĝoj kaj 750 ĉambroj - Oni volas krei pli favorajn kondiĉojn por la turismo en Pollando. Ĝis 1990 ekestu 1 miliono de aldonaj tranokteblecoj jare - Fine revenis al Pollando knabina ĥoro, kiu gastludis en 12 urboj de FRG, i.a. en Bonn, Munkeno kaj Bochum.

La ĉi-semajna Esperanto-Ekspreso ĉi tie en Nürnberg ne estis aŭdebla, el kelkaj neklaraj frazeroj, oni povis konkludi, ke la redakcianoj rakontis siajn rememorojn, kiel ili konatiĝis kun Esperanto kaj kiel ili fariĝis redakcianoj.

Berno. D-ro A. Baur daŭrigis siajn interesajn prelegojn. Ĉi-foje li parolis pri la sekvoj de la energetika krizo por Svislando. Fakte la krizo ĝis nun ne profunde trafis Svislandon, sed ĝi konsciigis al la homoj pri la limigo de la ekonomia kreskado. Kaj oni devas esti dankemaj al la araboj pro tiu scio. Sed ĉu oni povas haltigi la lokomotivon de nia ekonomio, kiu veturas tiel rapide, demandis la preleganto. Ĉiukaze ni devas esti pretaj je oferoj.

*******************

## Radio-Aŭskultantoj atentu!

Radio Zagreb informas ke ĝia elsendo por esperantistoj sur ondolongo 264 m estos ekde la 8a de marto 1974 ne plu ĵaŭdon, sed vendredon, kvin minutojn post noktomezo, laŭ MET.
Tion sugestis Kroatia Esperantista Junularo argumentinte, ke sabato estas por multaj libera tago kaj vendredo pli konvena por aŭskultado de malfrua nokta elsendo.

*******************

Pilo-Press Eldonanto kaj redaktoro Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 1, FRG.

Jara abono 30,- GM ( kun germana eldono END 40,- GM). Pilo-Press aperas ĉiusemajne. La germana eldono END aperas dufoje monate.

Sendu viajn abonkotizojn al Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1,
Pĉk. Nürnberg 819 56 - 851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.579
Aŭstria konto: Österreichische Länderbank, Bregenz 880.110.899/01
Svisa konto: Schweizerische Volksbank, St. Gallen KK 629 240